



# Kajeroj el la Sudo

BULTENO DE HISPANA ASOCIO DE LABORISTOJ ESPERANTISTAJ (HALE)

<http://kajeroj.50megs.com/k51.htm>

<http://www.iespana.es/kajeroj.htm>




N° 51

Julio/septembro 2001

# Kajeroj

---

## el la Sudo



### BULTENO DE HISPANA ASOCIO DE LABORISTOJ ESPERANTISTAJ (HALE)

**Prezidanto: Juan Antonio Cabezas Martínez,**  
c/ Jabonerías, 6-3ºD,  
ES30 001 Murcia (Hispanio)

**Sekretario: José Pina Tuells,**  
c/ Stª Teresa, 22-2º CD,  
ES30005 MURCIA

**Libroservo: María del Mar Guirao Gallego,**  
Avdª Juan Carlos I, 22-8H  
ES300800 Lorca

**Kasisto: José María Bernabéu Franco**  
Gral. Primo de Rivera, 8  
E-03360 Callosa de Segura,  
ALICANTE (Hispanio).

**Redaktoro: Jesuo de las Heras,**  
Apartado 4461  
ES30080 MURCIA

*Kajeroj el la Sudo* regule interŝanĝas kun:

- 1 *Esperanto*, redaktata de István Ertl,
  - 2 *Monato*, de Stefan Maul,
  - 3 *JDA Amiko*, de Geza Kuruez,
  - 4 *Sennaciulo*, de Krešimir Barkovič,
  - 5 *SAT-Amikaro*, de Jean Selle,
  - 6 *Internaciisto*, de Luis Serrano.
  - 7 *La Kancerkliniko*, de Jak le Puil,
  - 8 *Litova Stelo*, de Petras Čielauskas,
  - 9 *Liberecana Ligilo*, de Jakvo Schram,
  - 10 *Laŭte!*, de C. Baudé,
  - 11 *La Migranto*, de Antje Noordewier,
  - 12 *ES-TO*, de Aŭroro Bute,
  - 13 *SLEA-Infornilo*, de P. Persson,
  - 14 *Naturista vivo*, de Ervin Fenyöesi
  - 15 *La verda proleto*, de komitato.
- Al ĉiuj, dankon pro via subteno kaj lernigo.

*Pretigas la Kajeron:*

*Provkorekto: José Pina Tuells,*

*Redakto: Jesús de las Heras Jiménez.*

*Monsendo de kotizoj kaj abonoj al la nova konto*  
nº 0182 1854 47 0202 655 116 en libreta de  
BBVA. Sen aldona kosto. La abono kostas 1000  
pesetojn aŭ 6 eŭrojn. Kvitancon oni ricevos.



Ne subskribitajn  
artikolojn verkis  
la redaktoro.

**Oni povas  
reprodukti  
artikolojn, kondiĉe  
ke oni citu la  
originon.**

**Kovrilo:** Ni daŭrigas publikigon de *La Faraono*, sed ankaŭ informas pri pli novaj aferoj, kiel la Kongreso de HEF 60-a.

## Enhavo

Redaktore .....	3
Informoj de la prezidanto .....	4
Naciismo en la nova epoko .....	5
La Faraono .....	8
Poeto kaj poezio .....	14
De Oriento al Sudo .....	16
Ĉu honto?, mi diris .....	21
La Kongreso de San Javier, LX de HEF .....	22
Enkonduko en muzikon: Pri terminaroj .....	23
Statuto de SAT, dua paĝo .....	24

*Ni ne korespondos  
pri nepetitaj artikoloj.  
Tamen, ni klopodos  
publikigi ĉiun artikolo-  
n kies enhavo estas  
interesa kaj ne mis-  
traktas iun ajn per-  
sonon.*

*Pri la enhavo de  
la artikoloj  
respondecas la  
aŭtoroj mem, ne la  
redakcio.*

## Redaktore:

Mi alte taksas tiujn esperantistojn, kiuj dediĉis preskaŭ sian tutan vivon al Esperanto.

Ĝi lumigis iliajn tagojn, sed ili ankaŭ briligis nian lingvon, eĉ se ili nur uzas ĝin. Sed kutime ili faras pli ol tio. Instrui ĝin, ekzemple.



Kelkajn el tiuj esperantistoj mi trovis dum la lasta kongreso de

HEF (ties raporto vi trovos en paĝo 22-a), kaj mi deziras notigi aparte inter ili S-inon Trinitat' Garsian Kobaĉon, kies okdekjaraĝo ne ĝenas ŝian iluzion komuniki al revuaro esperanta, ke ŝi kaj samideano S-ro Rikart' Güel prezentis kaj dokumentis -laŭ invito- nian lingvon Esperanton antaŭ cent gelemantoj dum du horoj en la Instituto Anĥelita Ferrer, de Sant Kugat del Vaĝes' okaze de ties Internacia Semajno, en majo. La lernantoj montris sian intereson pri la temo per siaj demandoj. Oni invitis Trinitaton iri denove prelegi pri nia lingvo en alia klaso en junio. Ni esperu, ke tiu kristaliĝu en kurson de Esperanto en tiu lernejo la venontan jaron.

Alia ĝisosta esperantisto montras al ni sian verkaĵon en paĝoj 16-a ĝis 20-a, rutena Vladimir Kirda Bolhorves. Por ke oni sciu pri li kaj Rutenio, li mem prezentas sin en paĝoj 14-a kaj sekvanta. Mi esperas, ke legantoj ĝuu lian poezion. Li prezentas ĉi foje nur 7 poemojn el 7 malsamaj kolektoj. Ili temas pri la bedaŭrinda realaĵo de sia lando dum la lasta parto de la lasta jarcento.

Ĉapitrojn 2-an kaj 3-an de **La faraono** oni povas legi je paĝoj 8-a al 13-a, per kiu ni translokiĝas al malnova Egiptio. Pseŭdonima

*S a n c h o*  
Panza parolas pri la Naciismo en la nova epoko en paĝo 5-a, kaj li klarigas pri la rolo de deskto kaj maldekstro rilate al ĝi.



Juna Trinitat' (1930)

Pro tio, ke estis demandoj pri la Kurso de muziko de MEL, mi klarigas en la antaŭlasta paĝo pri la naturo de tiu kurso de mi proponata en niaj paĝoj. Ĝi daŭrigos en la venonta **Kajeroj** en la maniero kutima.

Dum la somera paŭzo, mi esperas kolekti sufiĉe da materialo por informi vin pri nia asocio kaj esperantaj okazoj en la mondo. Mi petas, ke oni kunlaboru per artikoloj, fotoj aŭ novaĵoj. Laste tiaj alfluo malrapidiĝis. bedaŭrinde.

Kamaradece,

*Jesua*



Prezidanto Sanĉo fieras pri Placo Esperanto.

## Informoj de la prezidanto



**Estimataj Samideanoj!**  
Denove la salutvortoj de la Prezidanto kaj kun la de-

mando kiel apogi grupojn de la Esperanto Movado?

Nek UEA nek SAT nek la Hispana Federacio de Esperanto trovis la solvon, ili studis tre bone la kialojn sed ili ne trovis la solvon.

HALE laboras en tiu ĉi vojo, ĉar ni scias ke se la grupoj de Esperanto mortas, mortos la Nacia Federacio, kaj poste la Internacia Organizaĵo de la movado Esperanto, kaj kiam tio okazos, mortigos la Esperanto kiel organizaĵo, kiel soci-intelegenco kaj tio signifas ke Esperanto kiel ideo, kiel utopio ankaŭ mortos.

La projekto de Hale nomiĝas “*la suno de Hispanio*”, kaj ni volas, legantaro, ke vi partoprenos kun ideojn, kun via koro.

La projekto estas tre kompleta ĉar ni volas apogi grupojn de Esperanto replenigi la grupojn de esperantistaro.

Ne interesas la kialoj de nia situacio, nek interesas mirinda dokumento, nur interesas la solvo.

Pravas tiuj, kiuj diras ke la solvo venas post la analizo de la situacio.

Laŭ tiu ĉi sistemo vi povas analizi la situacion sed ne volas granda analizado de la situacio, ni volas la solvojn de la grava problemo.

Pravas tiuj, kiu diras ke la grupoj estas modelo de la pasintaj du jarcentoj, sed ni devas defini la novaj aspektojn de la grupojn.

Pravas tiuj, kiuj diras ke Interreto estas nova vojo de la homaro al Esperanto, sed ili forgesas ke Interreto estas virtuala kaj pro tio ĉi ĝi ne estas la sola vojo.

Pravas tiuj, kiuj diras ke ekzistas multaj viroj kaj virinoj kiuj parolas Esperanton, sed ili ne estas en la organizaĵo, sed ili ne diras kiom da ili estas.

Ni prenas la urbon Mursjo kiel objekto de studoj. En Mursjo urbo ni estas ok samideanoj, kaj ni ĉiuj apartenas a la organizaĵo, ni kelkaj apartenas a la Federacio, aliaj al SAT, aliaj al UEA. Ne estas ni en la organizaĵo, kiu lernis Esperanto sed ne utiligas Esperanton.

Esperantista estas la persono kiu parolas Esperanton, sed esperantista ne estas la persono, kiu lernis Esperanto sed ne parolas ĝin.

Sed ne estas la problemo tia, nia problemo estas serĉi solvojn por niaj grupoj, por apogi ilin.

Gis baldaŭ

*Johano Antonio  
Cabezas Martínez*

## Naciismo en la nova epoko.

### Maldekstra naciismo

Ĉirkaŭ 1900a, maldekstruloj diskutadis pri *naciaj aferoj*. Kion maldekstro devas fari pri rapide kreskanta naciismo? Ĉu forte mobiliza ideologio estus minaco al socialismo aŭ ĉu nacia ideo donus eblon plifortigi potenco-bazon de maldekstra ideologio? Unu jarcento poste diskuto estas daŭre aktuala, abundas konfliktoj en kiuj maldekstro alprenas vidpunkton, sed pri kiuj mi havas miajn dubojn ĉu ili apartenas al *batalo* de anarĥiistaro. Ĉu ni subtenas batalon de eŭska liberiga naciismo aŭ kurda PKK, nur por menciigi kelkajn? Ĉu *bona* maldekstra naciismo ekzistas? Mi pensas, ke en nia rondo oni bezonas klarigon pri tio, kio estas nacio, tamen mi volas referenci pri tio al verkoj de Lanti: *Naciismo*, kaj *Manifesto de la Sennaciisto*, libro de Gilbert Ledon: *La Kolektiveco*, kaj broŝuro *Naciismo, Internaciismo kaj Sennaciismo*, de Jakvo.

Nacioj kaj popoloj estas eltrovaĵoj de potenculoj por regi popolon, tio estas la plej rekta klarigo, kiun mi povas doni al la koncepto. Komenciĝinte dum franca revolucio, ideo nacio ekhavis, ek de fino de la 19a jarcento, ksenofobian eron en ĝi. Kie en la komenco, lingvo kaj kulturo estis parametroj, etnismo iĝis pli kaj pli kriterio por indiki onian naciismon. En nacioj, proletaro devas kunlabori kun kapitalistaro, ĉar ili apartenas al sama nacio!!! Ekonomiaj problemoj estis certe kulpo de judoj kaj, post la dua mondmilito, de migrintaj laboristoj.

Dum maldekstraj diskutoj pri naciismo, oni de tempo klopodas vualoj naciisman ideologion per vortoj *maldekstra naciismo* kaj ideo estas, fari diferencon inter ksenofobia naciismo kaj naciismo subtenata de maldekstruloj. Ĉi tiu *progresema naciismo* havus aldonajn kiel toleremon, liberecon kaj egalecon. Do, samaj valoroj, kiujn uzas liberalaj - naciistoj, valoroj kiuj estus difereco inter ĝusta kaj malĝusta naciismo. Tamen la historio montras al ni, ke ĉi tiu *maldekstra naciismo* nek estas necesa, nek estas ebla. Ni devas akcepti, ke ni difinas dum la historio, iom krude, 5 periodojn de malsama signifo kaj politika koloro de ideo naciismo. Ni, laŭ mia kompreno, povas akcepti ke la konceptoj *nacio* kaj *naciismo* fontis el la Franca Revolucio. Dum la komenca tempo, koncepto *nacio* estis uzata kune kun ideo de *demokratio*. *Potenco al popolo* aŭ *nacio* estis progresema slogano kiu kontraŭstaris feŭdan sistemon. Certe komence *nacio* protektis interesojn de popolo kaj ligojn al lingvo, kulturo kaj etnismo estis preskaŭ sen signifo. Dum la dua fazo, post 1870, ni vidis naciismon bazitan sur etnismo. Ĉu eble troa etnismo direktis al la unua mondmilito? Post la unua mondmilito ni eniris trian fazon, dank' al *Wilson-doktrino*. Laŭ ĉi tiu doktrino, ĉiuj popoloj devas havi memdeterminon (decidrajton pri si mem), kaj pro tio rajton al propra ŝtato. Dum longa tempo ĉi tiu principo estis esenco de liberala - naciismo. Dum ĉi tiu fazo, naciismo ligiĝis al faŝismo kun rezulto de la Dua

Mondmilito kaj buĉado de miljonoj da judoj, ciganoj, gejoj kaj politikaj malamikoj. La kvara fazo, post la Dua Mondmilito, estis karakterizata de ideologia superrego de maldekstro, kiu eĉ direktiĝis ĝis koncepto ke naciismo povus esti maldekstra ideologio, plej verŝajne pro manko de dekstra konkurenco. El tiu tempo, ni memoras pri sinsekvaj naciaj liberigo-bataloj en Sud Afriko, Afriko kaj Azio.

### Kontraŭ Usonismo

Nun ni troviĝas en la kvina periodo. Post falo de la *berlina muro* eĉ iom antaŭ ĉi tiu tempo, influo de maldekstra ideologio rapide malaperis. *Nova dekstro* konfuziĝis per sia kontraŭ-usonismo kaj siaj enmiksaĵoj en solidarecaj kampanjoj kun liberigo-batalantoj. Ili fakte transprenis rolon de maldekstro kiu entute perdis fadenon post malapero de la ŝtat-kapitalismo en iama Sovetio. Estas tempo ke ni decidu ĉu maldekstra naciismo havas sencon, ĉu eblas, ĉu necesas?

### Elitaj konstruoj

Indas peno almontri, ke kun institucioj de sklaveco, edziniĝo, socia klaso kaj ŝtato, necesis unuaj ideologioj de rasismo, rolo de seksoj, klaso-elitismo kaj naciismo kiel pravigo de ĉi tiuj institucioj.

Historio instruas nin ke naciismo estas eltrovaĵo de reganta klaso. *Nacia idearo* ekviviĝis pro volo de malgranda elita klaso de intelektuloj antaŭ kelkaj jarcentoj. Ni ne mireblas, ke naciismo estas ideologio servanta al reganta klaso de blankaj, heteroseksmaj viroj. Ili

eltrovis nacion. Normoj kaj valoroj de nacio estis la patriarkaj, heteroseksmaj kaj kapitalismaj normoj kaj valoroj de elito. Mito de nacia unueco plifortigis potencon de ŝtatestroj kaj ilian potencon postuli impoŝton kaj fari militojn. Krome, ĝi estis drasta rimedo kontraŭ klasbatalo, socialismo kaj virinismo.

### Naciismo estas dekstra koncepto

Tiu fakto, ke naciismo kaj nacioj estas mitoj, eltrovataj kaj aplikataj de reganta klaso, malebligas al ni, certe preskaŭ ne ebligas, ke ni subtenos naciismon kiel liberigo-ideologion. Maldekstraj naciistoj transprenas al naciisma ligita konceptkadro, pro kio ili apenaŭ povas eviti transpreni aŭ analizi mondon kun terminoj antaŭviditaj de kontraŭuloj.

Laŭ naciistoj, virinoj en *nacio* devas plenumi specialan rolon. Nacio estas en naciaj metaforoj *fekunda patrinejo* protektata de fortaj viroj. Soldatoj kaj futbalistoj defendas honoron de patrio. Nacio ebligas viron senti superecon al virinoj. Virinoj reproduktas pere de siaj posteuloj biologian simbolon de nacioj.

Maldekstro devas kompreni ke, kiam ili subtenas idearon de nacio kaj naciismo, ili helpas al nova dekstra strategio de grupoj, kiel sufiĉe konataj ekstremdekstraj politikaj partioj, akiri legitimecon kaj akcepteblecon por iliaj faroj kaj agoj. Terminoj *libera* kaj *lumigita* havas tute alian signifon ĉe dekstro ol ĉe maldekstro kaj ni neniam forgesas tion. Mi ne povas malaperigi el mia kapo ke idearo, nacio estas koncepto de dekstraj regantoj kaj plej verŝajne rasismo, ekskluzivigo kaj genocido estas nedisigeble ligitaj al ideo naciisma.

## Liberigo-Batalo

Okcidenta naciismo ne estas sama kiel *maldekstra liberigo-naciismo* aŭ *emancipa naciismo* en malriĉaj landoj. Same kiel virina batalo emancipiĝo ne estas fina celo. Liberigitaj sendependaj kolonioj povas nur atingi lokon en kapitalisma mondo kiam ili mem subpremas kaj profitas kiel okcidentaj landoj, do nacia liberigo-batalo ne povas esti celo por si mem.

Maldekstrularo ĉiam devas starigi al si demandon kial tiu aŭ tiuj liberigo-batalo necesas subtenon. Ĉu rilatas al sendependiĝo kiel paŝo al sociala batalo aŭ ĉu ni simple subtenas batalon de naciistoj. Ĉu batalo kontraŭ *apartheid* en Sud-Afriko alportis plenan liberiĝon al ĉiuj enloĝantoj en ĉi tiu lando, ĉu subteno al batalo de ANC estis *bona maldekstra batalo*. Ĉu ni subtenu ETAn en Eŭskio kaj batalon de zapatistoj aŭ lukto de PKK en Turkio? Ĉu en la tuta nacia kaj naciisma batalo ni retrovas eron de respekto al individuo kaj ĉu entute ni retrovas eron de maldekstra penso? Fina demando por mi estas, ĉu kiam ni subtenas naciojn kaj naciismon, ni ne samtempe subtenas radikon de kapitalismo?

*Sancho Panza*

(Publikigita en *Liberecama Ligilo*)

## La kongreso de San Javier (venas de paĝo 22-a)

La kongreso daŭris tri tagojn: de la 22-a ĝis la 24-a de junio, kaj okazis en la Centro Civita de Parko Almansa. Estis postkongreso dum tri pluaj aliaj tagoj, en kiuj kelkaj partoprenantoj larĝe vizitis la Aŭtonoman Komunumon de Mursjo.

Substrekindas la laboro, kiun faris Tomaso Ortiz García kaj Vicente Sánchez Lumbreras, kiu eĉ kreis Tut-Tera-Teksajan paĝon, kiu informis pri la kongreso de



Tomaso Ortiz



Vicente Sánchez

kelkaj semajno antaŭ ol tiu okazis, kaj kiun oni ankoraŭ povas konsulti je <http://www.60kongreso.50megs.com/>. La paĝo estas en Esperanto kaj la hispana, franca, germana, kataluna, angla, rusa, itala kaj portugala. Interese estas, ke la *surpapera versio* de tiu paĝo estas la **Kongresa Libro**. Je paĝo 28 oni trovas interesan artikolon, *Biografio de Esperanto: de Zamenhof al Codorniu*, kiun Vicente Sánchez Lumbreras kompilis baze de verkoj de José Luis Pérez Óvilo (**Esperanto de Zamenhof al Kodorniu**) kaj Norman Berdichewski (**Patrino de lingvoj**).

Ĝis Teruel!



# La Faraono

## ĈAPITRO II

Lia ekscelenco Herhor senprokraste ordonis al sia adjutanto, kiu portis la hakilon, preni la komandon de la avangardo anstataŭ Eunana. Poste li sendis ordonon, ke la maŝinoj por jetado de grandaj ŝtonoj deveturu de la ŝoseo en la intermonton kaj ke la grekaj soldatoj faciligu la trairon en malfacilaj lokoj. Ĉiuj veturiloj kaj portiloj de la sekvantaro ekveturu en la fino.

Kiam Herhor donis la ordonojn, la adjutanto portanta la ventumilon proksimiĝis al la skribisto Pentuer kaj murmuretis:

- Kredeble neniam plu oni povos veturi sur ĉi tiu ŝoseo...

- Kial? - respondis la juna pastro.

- Se du skaraboj baris nian vojon, ne konvenas plu iri sur ĝi. Povus okazi malfeliĉo.

- Ĝi jam okazis. Ĉu vi ne rimarkis, ke la princo Ramzes ekkoleris kontraŭ la ministro? Kaj nia sinjoro ne apartenas al tiuj, kiuj forgesas...

- Ne nia sinjoro ofendis la princon, sed kontraŭe li sentis sin ofendita kaj severe riproĉis la filon de l' faraono - respondis Pentuer. - Kaj li bone faris, ĉar al la princo jam hodiaŭ ŝajnas, ke li estos dua Menes...

- Pli ĝuste Ramzes Granda - interrompis la adjutanto.

- Ramzes Granda obeis la diojn, jen kial li havas en tiuj temploj laŭdajn surskribojn. Sed Menes, la unua egipta faraono, estis detruanto de l' ordo, kaj nur dank' al patra indulgo de la pastroj oni citas lian nomon... Tamen mi ne donus unu utenon, ke la mumio de Menes ekzistas.

- Mia Pentuer - daŭrigis la adjutanto - vi estas saĝulo, vi do komprenas, ke estas indiferece por ni havi dek sinjorojn aŭ dek unu...





- Sed por la popolo ne estas indiferente, ĉu li devas elfosi ĉiujare unu monton da oro por la pastroj aŭ du montojn: por la pastroj kaj por la faraono - respondis Pentuer kaj liaj okuloj ekbrilis.

- Vi meditas pri danĝeraj aferoj - murmuretis la adjutanto.

- Kiom da fojoj vi mem parolis kun indigno pri la frenezaj elspezoj de la faraona kortego kaj de la nomarĥoj? - demandis mire la pastro.

- Silentu... silentu!... Ni parolos ankoraŭ pri tiuj ĉi aferoj, sed ne nun.

Malgraŭ la sablo la maŝinoj, ĉiu tirata de du bovoj, pli rapide ruliĝis en la dezerto, ol sur la ŝoseo. Apud la unua iris Eunana ĉagrenita kaj meditanta: kial la ministro forprenis de li la komandon de la avangardo? Ĉu oni intencas konfidi al li pli altan postenon?

Atendante do novan karieron, kaj eble por trankviligi la dubojn, kiuj turmentis lian koron, li prenis stangon kaj subtenis la baliston ĉie, kie la sablo estis pli profunda, aŭ instigis la Grekojn per krio. Sed ili malmulte atentis lin.

Jam duonhoron la taĉmento iris en la serpentolinia intermonto; kies muroj estis nudaj kaj krutaj, kiam la avangardo ree haltis. En ĉi tiu loko estis alia intermonto, transversa, en kies mezo estis elfosita sufiĉe larĝa kanalo.

Kuriero sendita al la ministro kun la sciigo pri la malhelpo, alportis ordonon senprokraste plenigi la kanalon per tero.

Ĉirkaŭ cent grekaj soldatoj kun pinthakiloj kaj fosiloj rapide eklaboris. Unuj dishakis la ŝtonegojn, aliaj jetis la fragmentojn en la kanalon kaj surŝutis sablon.

Subite el la fundo de l' intermonto eliris homo kun pintohakilo, kiu havis formon de cikonia kolo kun beko. Tio estis egipta kamparano, majjuna, tute nuda. Momenton kun plej granda miro li rigardis la laboron de la soldatoj, poste subite li saltis inter ilin, kriante:

- Kion vi faras, idolistoj, tio ja estas kanalo?...

- Kaj vi, kiel vi kuraĝas insulti la soldatojn de lia sankteco? - demandis lin Eunana, jam ĉeestanta tie.

- Mi vidas, ke vi devas esti Egiptano altranga - respondis la kamparano - mi do respondos al vi, ke la kanalo apartenas al potenca sinjoro: li estas ekonomo de la skribisto de tiu, kiu portas la ventumilon de lia ekscelenco la nomarĥo de Memfiso. Gardu do vin, ke malfeliĉo ne trafu vin!...

Ili ne komprenis liajn vortojn, sed la tono mirigis ilin.

- Ili daŭrigas! - diris la kamparano kun pligrandiganta teruro. - Ve al vi, hundoj! - ekkriis li ŝin jetante kun la hakilo al unu el la soldatoj.

La Greko elŝiris la hakilon, kaj ekbatis lin tiel forte je la dentoj, ke sango ekspruciis el la buso. Kaj poste li revenis al la laboro.

Duone ŝvenigita per la bato, la kamparano perdis la kuraĝon kaj komencis petegi:

- Sinjoro - diris li - ĉi tiun kanalon mi elfosis mem dum dek jaroj, tage kaj nokte, eĉ en la festoj! Nia sinjoro promesis, ke se mi sukcesos alkonduki akvon al ĉi tiu valetto, li faros min terkulturisto sur ĝi, donos al mi la kvinonon da rikolto kaj donacos la liberon... Cu vi aŭdas?... La liberon al mi kaj al miaj tri infanoj!... Ho dioj!...

Li levis la manojn al la ĉielo kaj ree sin turnis al Eunana:

- Ili min ne komprenas, ĉi tiuj transmaraj barbuuloj, idoj de hundoj, fratoj de Fenicianoj kaj Hebreoj! Sed vi, sinjoro, vi aŭskultos mian peton... De dek jaroj, kiam la aliaj iris al la foiro aŭ dancado aŭ sankta proceso, mi ŝteliris en ĉi tiun negastaman intermonton. Mi ne iris al la tombo de mia patrino - mi fosis; mi forgesis pri la mortintoj, por doni al miaj infanoj kaj al mi mem liberon kaj teron almenaŭ unu tagon antaŭ la morto... Estu miaj atestantoj, ho dioj, kiom da fojoj surprizis min ĉi tie la nokto!... Kiom da fojoj mi aŭdis ĉi tie la plendajn voĉojn de hieno kaj vidis la verdajn okulojn de lupoj! Sed mi ne forkuradis, ĉar kien mi povus forkuri, kiam sur ĉiu vojeto atendis min la teruro, kaj en ĉi tiu kanalo la libereco tenis min je la piedoj?... Foje, tie, post ĉi tiu breco venis renkonte al mi leono, la faraono de ĉiuj bestoj. Mi ekgenuis antaŭ li kaj, kredu al mi, mi diris la jenajn vortojn: »Sinjoro, cu vi bonvolus min manĝi?...

*Mi ja estas nur sklavoj! «La rabema leono ekkompatis min; la lupoj evitis min, ec la perfidemaj vespertoj indulgis mian, malfeliĉan kapon, kaj vi Egiptano...*

*La kamparano eksilentis: li rimarkis la proksimiĝantan sekvantaron de la ministro Herhor. La ventumilo montris al li, ke tio estas altrangulo, la pantera felo - ke tio estas pastro. Li do kuris al li, ekgenuis kaj tuŝis la sablon per la kapo.*

*- Kion vi volas, homo? - demandis la ministro.*

*- Lumo de la suno, aŭskultu min; - ekkriis la kamparano.  
- Estu neniu ĝemo en via cambro kaj la malfeliĉo ne iru post vi! Nenio malhelpu viajn agojn kaj la fluo ne forportu vin, kiam vi veturos sur Nilo al la alia bordo...*

*- Mi demandas, kion vi volas? - ripetis la ministro.*

*- Grandanima sinjoro, - daŭrigis la kamparano - gvidisto sen kapricoj, vi venkas la malveron kaj kreas la veron, vi, kiu estas la patro de la malfeliĉulo, la edzo de la vidvino, la vesto de la orfo... Permesu al mi disporti vian nomon, kiel la leĝon de la lando... Permesu al via nomo pasi inter miaj lipoj... Aŭskultu kaj faru la juston, plej nobla el la noblaj... [La babilado de la kamparano estas aŭtentika]*

*- Li volas, ke oni ne plenu la kanalon - diris Eunana.*

*La ministro levis la ŝultrojn kaj ekiris al la kanalo, sur kiu oni metis tabulon. La malesperinta kamparano kaptis lin je la piedoj.*



*- For kun tio!... - ekkriis la ministro, forpasante kvazaŭ de l' mordo de vipero.*

*La skribisto Pentuer deturnis la kapon, lia malgrasa vizaĝo havis grizan koloron. Sed Eunana kaptis la kamparano je la nuko, kaj ne povante forŝiri lin de la piedoj de l' ministro, alvokis soldatojn. Post momento lia ekscelenco liberigita, transiris la kanalon, kaj la soldatoj forportis la kamparano preskaŭ en la aero al la fino de la taĉmento. Ili donis al li kelkdekon da pugnobatoj, kaj la suboficiroj ĉiam armitaj per kanoj kalkulis al li kelkdekon da bastonoj kaj fine jetis lin apud la eniro en la intermonton.*

*Batita, sanganta kaj terurita, la mizerulo momenton sidis sur la sablo, frotis la okulojn kaj subite salte leviginte, komencis forkuri al la ŝoseo, ĝemante:*

*- La tero englutu min!... Malbenita estas la tago, en kiu mi ekvidis la lumon, kaj la nokto en kiu mi diris: »Homo naskiĝis... «En la mantelo de la justeco ne ekzistas eĉ unu peco por la sklavoj. La dioj ne rigardas tian kreaĵon, kiu havas manojn nur por la laboro, buŝon nur por la ploro, kaj dorson por la bastonoj. Ho morto, cindrigu mian korpon por ke tie, sur la kampoj de Oziriso, mi ne renaskiĝu sklavoj...*

## ĈAPITRO III

*Spiregante de kolero la princo Ramzes grimpis sur la monteton, kaj post li Tutmozis. La elegantulo havis la*

*perukon antaŭo posten, lia barbo defalis, li do portis ĝin en la mano; malgraŭ la lacigo li estus pala, se la ruĝo ne kovrus lian vizaĝon.*

*Fine la princo haltis sur la supro. De la intermonto flugis al ili la krioj de la soldataro kaj la bruo de la ruligantaj balistoj; antaŭ ili kuŝis la vasta lando Gosen, baniganta en la briloj de la suno. Ŝajnis, ke tio ne estas tero, sed ora nubo, sur kiu la songoj pentris pejzagon per koloriloj el smeraldoj, argento, rubenoj, perloj kaj topazoj.*

*La kronprinco etendis la manon.*

*- Rigardu - ekkriis li al Tutmozis - tie devas esti mia tero, kaj ĉi tie mia armeo... Kaj tie plej altaj konstruaĵoj estas la palacoj de l'*

pastroj, kaj ĉi tie - plej alta estro de la armeo estas pastro!... Ĉu oni povas toleri tion?

- Ĉiam estis tiel - respondis Tutmozis, malkuraĝe rigardante ĉirkaŭe.

- Tio estas malvera! Mi ja konas la historion de ĉi tiu lando, kaŝitan por vi. Estroj de la armeoj kaj de l' oficistoj estis sole la faraonoj, aŭ almenaŭ la plej energiaj el ili. Ili ne pasigis la tagojn farante oferojn au preĝante, sed regante la ŝtaton.

- Se tia estas la volo de lia sankteco... - interrompis Tutmozis.

- Ne estas la volo de mia patro, ke la nomarfoj regu despote en siaj ĉefurboj, kaj ke la etiopia vicreĝo sin opinias egala al la reĝo de l' reĝoj. Kaj ne povas esti volo de mia patro, ke lia armeo ĉirkaŭiras du orajn skarabojn, tial ke la ministro de l' milito estas pastro.

- Li estas granda batalisto!... murmuretis Tutmozis pli kaj pli senkuraĝe.

- Kia batalisto!... Car li venkis plenmanon da libiaj rabistoj, kiuj devas forkuri nur ekvidinte la jakojn de la egiptaj soldatoj? Sed rigardu, kion faras niaj najbaroj. Izraelo malfruas kun la tributo kaj pagas malpli kaj malpli. La ruza feniciano ĉiujare reprenas kelke da ŝipoj el nia eskadro. Kontraŭ hetoj, oriente, ni estas devigataj havi preta grandan armeon, kaj ĉirkaŭ Babilono kaj Ninivo bolas movado, kiun oni sentas en la tuta Mezopotamio.

Kaj kia estas la definitiva rezultato de la regado de l' pastroj? La jena: mia praavo havis 100 mil talentojn da jara enspezo kaj 160 mil soldatojn, mia patro havas apenau 50 mil talentojn kaj 120 mil soldatojn.

Kaj kia estas la armeo!... Se ni ne havus la grekan korpuson, kiu tenas ilin en ordo, kiel la hundo la ŝafojn, jam hodiaŭ la egiptaj soldatoj obeus nur la pastrojn, kaj la faraono ne diferencus de simpla nomarfo.

- De kie vi scias tion?... De kie venas tiaj pensoj? - miris Tutmozis.

- Cu mi ne devenas de la gento de l' pastroj! Ili ja instruis min, kiam mi ne estis ankoraŭ kronprinco. Oh, kiam mi fariĝos faraono, post mia patro, kiu vivu eterne, mi metos sur iliajn nukojn mian piedon en fera sandalo... Antaŭ tio mi etendos mian manon al iliaj trezorejoj, kiuj estis ĉiam plenaj; sed kiuj de l' tempo de

Ramzes Granda komencis ŝveli kaj hodiaŭ estas tiel dikaj de oro, ke post ili oni ne vidas la trezorejon de l' faraono.

- Ve al mi kaj vi!, - sopiris Tutmozis. - Vi havas intencojn, sub kiuj kurbiĝus ĉi tiu monteto, se ĝi aŭdus kaj komprenus ilin. Kaj kie estas viaj fortoj?... helpantoj?... soldatoj?... Kontraŭ vi starigos la tuta popolo, kondukata de la potenco kasto... kaj kun vi? La princo aŭskultis kaj ekmeditis. Fine li respondis:

- La armeo.

- Granda parto sekvas la pastrojn.

- La greka korpuso.

- Barelo da akvo en Nilo.

- La oficistoj.

- Duono apartenas al ili.

Ramzes malĝoje balancis la kapon kaj eksilentis.

De la supro ili malsupreniris sur nuda kaj ŝtonplena deklivo al la alia flanko de la altaĵo. Subite Tutmozis, kiu iris antaŭe, ekris:

- Ĉu sorĉo frapis miajn okulojn?... Rigardu, Ramzes!... Inter ĉi tiuj ŝtonegoj estas ja kaŝita dua Egipto!

- Kredeble tio estas bieno de pastro, kiu ne pagas impostojn, - maldolce respondis la princo.

Ce iliaj piedoj, en la fundo kuŝis fruktodona valo, kiu havis formon de forko, kies dentoj estis kaŝitaj inter la ŝtonoj. En unu angulo oni vidis kelke da dometoj por la servistoj kaj belan dometon de la posedanto aŭ administranto. Tie kreskis palmoj, vinberujoj, olivarboj, figujoj kun radikoj en la aero, cipresoj, eĉ junaj baobaboj. En la mezo fluis akva strio, sur la deklivoj de l' altaĵoj ĉiun kelkcenton da paŝoj oni vidis malgrandajn lagetojn.

Malsuprenirinte inter la vinberejoj, plenaj de maturaĵ fruktoj, ili ekaŭdis virinan voĉon, kiu vokis aŭ pli ĝuste kantis per melankolia tono:

- Kie vi estas, mia kokinetto? respondu, kie vi estas mia plej amata?... Vi forkuris de mi, kvankam mi mem donas al vi akvon kaj nutras vin per tiel pura greno, ke sopiras la sklavoj... Kie vi estas?... respondu!... Ne forgesu, ke



la nokto surprizos vin kaj vi ne retrovos la domon, kie ĉiuj servas al vi; aŭ alflugos de la dezerto flavruĝa vulturo kaj dissiros vian koron. Tiam vi vane vokados vian sinjorinon, kiel nun mi vin... Respondu, alie mi ekkoleros kaj foriros, kaj vi devos sekvi min piedire.

La kanto proksimiĝis al la vojaĝantaj. La kantantino estis kelke da pasoj de ili, kiam Tutmozis, enŝovinte la kapon inter la arbetojn, ekkriis:

- Rigardu, Ramzes, ĉarma knabino?...

La princo anstataŭ rigardi saltis sur la vojeton kaj baris la vojon al la kantantino. Efektive ŝi estis bela knabino kun grekaj trajtoj kaj vizaĝo kvazaŭ el eburo. Sub la vualo, kiu kovris la vizaĝon, pendis riĉaj, nigraj haroj, ligitaj en nodo. Ŝi havis blankan longan veston, kiun ŝi levis de unu flanko per la mano; sub la diafana ŝtofo oni vidis ŝiajn virgajn brustojn, similajn al pomoj.

- Kiu vi estas, knabino? - ekkriis Ramzes.

Malaperis la minacaj sulkoj de lia vizaĝo, liaj okuloj ekbrilis.

- Ho Jehovo!... patro!... - kriis ŝi terurita kaj haltis senmove sur la vojeto.

Sed post momento si trankviliĝis, kaj ŝiaj veluraj okuloj ree rigardis kun la kutima dolĉa melankolio.

- Kiel vi venis ĉi tien?... - demandis ŝi la princon per iom tremanta voĉo. - Mi vidas, ke vi estas soldato, kaj al la soldatoj estas malpermesite eniri ĉi tien.

- Kial malpermesite estas?

- Ĉar tio estas tero de granda sinjoro, Sezotris...

- Oh, oh! - ridetis Ramzes.

- Ne ridu, ĉar vi tuj paliĝos. Sinjoro Sezotris estas skribisto de sinjoro Haires, kiu portas la ventumilon super lia ekscelenco, nomarĥo de Memfiso.

- Oh, oh!... - ripetis Ramzes, seninterrompe ridante.

- Viaj vortoj estas malrespektaj - diris la knabino sulkigante la brovojn. - Se mi ne legus bonecon sur via vizaĝo, mi pensus, ke vi estas greka dungato aŭ bandito.

- Ankaŭ ne, sed iam li eble fariĝos plej granda bandito,

kiun portis la tero - intermetis la eleganta Tutmozis, ordigante la perukon.

- Kaj vi, vi sendube estas dancisto - respondis la knabino kuraĝiĝinte. - Oh, mi estas eĉ certa, ke mi vidis vin en la foiro en Pi-Bailos: vi sorĉis serpentojn...

Ambaŭ junuloj gaje ekridis.

- Kaj kiu vi estas? - demandis Ramzes la knabinon, prenante ŝin je la mano, kiun ŝi retiris.

- Ne estu tiel kuraĝa, mi estas Sara, filino de Gedeon, administranto de ĉi tiu bieno.

- Hebreino? - demandis Ramzes, kaj nubo pasis sur lia vizaĝo.

- Ne grave, ne grave... - ekkriis Tutmozis. - Ĉu vi pensas, ke Hebreinoj estas malpli dolĉaj ol Egiptaninoj?... Ili estas nur pli modestaj kaj malfacilaj, kaj tio aldonas al ilia amo specialan ĉarmon.

—Vi do estas idolistoj - diris Sara kun memrespekto.— Ripozu, se vi estas laĉaj, deŝiru vinberojn kaj foriru kun Dio. Niaj servistoj ne volonte akceptas tiajn gastojn.

Ŝi volis foriri, sed Ramzes retenis ŝin.

- Haltu... Vi plaĉas al mi, vi ne povas tiel nin forlasi.

- Malbona spirito ekposedis vin. Neniu en ci tiu valo kuraĝus tiel paroli al mi... - indignis Sara.

- Aŭskultu, - interrompis Tutmozis - ĉi tiu junulo estas oficiro de la pastra regimento Ptah kaj skribisto de skribisto de tia sinjoro, kiu portas ventumilon super la portanto da l' ventumilo de l' nomarĥo Habu. . - Sendube li estas oficiro - respondis Sara, medite rigardante Ramzeson. - Eble li mem estas granda sinjoro?... - aldonis ŝi metante unu fingron sur la buŝon.

- Kiu ajn mi estas, via beleco superas mian rangon - diris li subite.

- Sed diru al mi, ĉu vere vi... manĝas porkaĵojn?...

Sara rigardis lin ofendite, kaj Tutmozis diris:

- Oni tuj vidas, ke vi ne konas hebreojn. Eksciuj do, ke Hebreo preferus morti, ol manĝi porkaĵojn, kiun cetere mi ne trovas plej malbona...

- Sed vi mortigas la katojn? - insistis Ramzes, premante la manojn de Sara kaj rigardante ŝiajn okulojn.

- Ankaŭ tio estas fabelo... senhonta fabelo!... - ekkriis Tutmozis. - Vi povis demandi min pri tio, anstataŭ diri sensencaĵojn... Mi jam havis tri amatinojn hebreinojn...



- Ĝis nun vi diris la veron, sed nun vi mensogas - interrompis lin Sara. - Hebreino neniam estos ies amatino! - aldonis ŝi fiere.

- Eĉ amatino de skribisto de tia sinjoro, kiu portas la ventumilon super la nomarĥo de Memfiso?... - demandis Tutmozis per moka tono.

- Eĉ...

- Eĉ amatino de la sinjoro, kiu portas la ventumilon? Sara ŝanceliĝis, sed respondis:

- Eĉ.

- Ŝi do ne fariĝus amatino de l' nomarĥo...

La knabino mallevis la manojn. Mire ŝi rigardis la junulojn unu post la alia; ŝiaj lipoj tremis, ŝiaj okuloj vualĝis de larmoj.

- Kiu vi estas?... demandis ŝi kun timo. - Vi venis de l' montoj, kiel vojaĝantoj, kiuj petas panon kaj akvon... Sed vi parolas al mi, kiel plej grandaj sinjoroj... Kiu vi estas?... Via glavo - si turnis sin al Ramzes - estas ornamita per smeraldoj, kaj sur la kolo vi havas ĉenon tian, kian ne posedas en sia trezorejo eĉ nia sinjoro, la grandanima Sezotris...

- Prefere respondu al mi, ĉu mi placas al vi? - demandis insiste Ramzes, premante siajn manojn kaj ame rigardante ŝiajn okulojn.

- Vi estas bela, kiel la anĝelo Gabrielo, sed mi timas vin, ĉar mi ne scias, kiu vi estas.

Subite post la montoj eksonis trumpeto.

- Oni vokas vin - ekkriis Tutmozis.

- Kaj se mi estus same granda sinjoro, kiel via Sezotris?... - demandis la princo.

- Tio estas ebla... - murmuretis Sara.

- Kaj se mi portus la ventumilon super la nomarĥo de Memfiso?...

- Vi povas esti eĉ tiel granda... Ie sur la monteto la trumpeto eksonis duan fojon.

- Ni iru, Ramzes! - insistis Tutmozis terurita.

- Kaj se mi estus... la kronprinco, ĉu vi venus, knabino, al mi?... - demandis la princo.

- Ho Jehovo!... - ekkriis Sara kaj falis sur la genuojn. Nun en diversaj punktoj la trumpetoj ludis alarman alvokon.

- Ni kuru!... - kriis malespere Tutmozis. - Ĉu vi ne aŭdas la alarmon?...

La kronprinco rapide demetis la ĉenon de sia kolo kaj surmetis ŝin al Sara.

- Donu ĝin al via patro - diris li - mi aĉetas vin de li. Adiaŭ... Li pasie kisis ŝian buŝon, kaj, ŝi cirkaŭpremis liajn piedojn. Li ŝin elŝiris, forkuris kelke da pasoj, poste revenis kaj ree karesis per kisoj ŝian belan vizaĝon kaj ŝiajn korvajn harojn, kvazaŭ ne aŭdante la senpaciencajn alvokojn de la armeo.

- En la nomo de lia sankteco la Faraono, mi alvokas vin, iru kun mi!... - ekkriis Tutmozis kaj kaptis la princon je la mano.

Ili ekkuris galope al la sono de la trumpetoj. Ramzes de tempo al tempo ŝanceliĝis kiel ebria kaj turnis la kapon. Fine ili komencis grimpi sur la kontraŭnan monteton.

- Kaj ĉi tiu homo - pensis Tutmozis - volas batali kontraŭ la pastroj!...



Antikvaj egiptanoj tute ne hontis pri nudeco.  
Desegno de Megaera Lorentz.



## Poeto kaj poezio



*Antaŭ ol prezenti al vi kelkajn unuajn segmentojn de mia verko, mi sentas devon koncize prezenti min, ĉar mi supozas ke en via psiko kaŭras la demando: Kiu estas la homo kiu turnas sin al mi dezirante ke mi ekkonu la parton de lia kreado?*

*Mi apartenas al la rutena nacieco. Rutenoj estas eta mezeŭropa etno sen nun ekzistanta originŝtato. Aroj de tiu etno, kies nombro varias inter kelkaj miloj kaj kelkaj dekmiloj da personoj, vivas en Ukrainio, Pollando, Ĉeĥio, Slovakio, Hungario, Jugoslavio, Kroatio, Usono kaj Kanado.*

*En Jugoslavio estas ĉirkaŭ dekok mil rutenoj. Plejmulte da ili vivas en Vojvodino. Ili konfesas greko-katolikan religion. Iliaj foraj prauloj vivis sur Karpatoj. En sudajn partojn de Panonia ebena almigris ili antaŭ du jarcentoj kaj duono, dum la regtempo de imperiestrino Maria*

*Terezia.*

*Mi naskiĝis en la jaro 1942 en Ruski Krstur, vilaĝo estanta neoficiala ĉefloko de jugoslaviaj rutenoj. (Lokaj loĝantoj nomas ĝin Ruski Kerestur, kelkfoje nur Kerestur.) Fininte la studon en la Supera maŝinteknika lernejo en Novi Sad, mi oficis en kelkaj fabrikoj kiel fabriksekcia inĝeniero, poste mi diplomiĝis ĉe la Ekonomia fakultato en Subotica, kaj en Beograd magistriĝis en la Departemento de kultursociologio ĉe la Fakultato de politikaj sciencoj, per la tezo **“Kultursociologiaj aspektoj de la kritiko de dogmatismo en la jugoslavia romano 1985-1988”**.*

*Ekde la jaro 1976 mi oficis en Televido Novi Sad, kiel ĵurnalisto de Rutena redakcio. Nuntempe mi havas funkcion de redaktoro de kompleksaj elsendoj. Mi preparas tv-reporteraĵojn, redaktadas aŭ en la studio gvidas iujn elsendojn, mi ankaŭ plenumadas aliajn ĵurnalistajn taskojn - kaj dum la tuta tempo mi estas obsedita per deziro forlasi ĵurnalistan agadon, kiu forprenadas al mi la tempon kaj sanon (precipe la nervojn); mi, do, estas penetrata per emo dediĉiĝi al mia vivoverko. Tiun deziron mi, verŝajne, povos realigi nur kiam mi emeritiĝos.*

*Sekvas la tutaĵo en kiu mi, per kelkaj malmultvortaj alineoj, prezentos al vi mian literaturan verkon.*

*Kuna titolo de ĉiuj miaj rimarkindaj volumoj estas “Revante*



la stelon de Heŭteranio”.

Volumoj estas grupigitaj en tetralogioj, kaj inter tiuj tetralogioj estas apartig-libroj. Volumoj de tetralogioj konsistas el prozaj (romanaj kaj aŭtobiografiaj) ĉapitroj, kaj la apartig-libroj konsistas el poetaj cikloj.

Supozante ke miaj Esperantaj amikoj, konataj kaj nekonataj, ne havus tempon kaj paciencon por legi tiel grandvoluman verkon, kiun mi ĝis nun kreis (kaj la verkado plue daŭras), mi decidis fari, el segmento de volumoj de la Unua tetralogio, la romanon “Esperoj, realigoj”. En tiu resuma romano enestis la temoj kiuj, laŭ mia opinio, interesas geesperantistojn en Eŭropo kaj la tuta mondo. Tio estos epizodoj el la vivo kaj aktivado de jugoslaviaj, grekaj kaj germanaj esperantistoj, kaj epizodoj el la ĉiutaga memmastrada praktiko en Jugoslavio de Tito dum la sesdekaj jaroj (la memmastradon pritraktis kritike iuj el la romanroluloj jam en tiu tempo, kaj nuntempe estas tute klare ke ĝi estis mistrafo), samkiel epizodoj el la Munkena ĉiutaga travivado de la ĉefa romanheroo Alek Vislavski, arkitekto, pentristo kaj esperantisto.

Mi prezentas al vi sep poemojn el la Unua apartig- libro. Tiu libro, la kvina volumo de literatura girlando **Revante la stelon de Heŭteranio**, apartigas volumojn de la Unua kaj Dua tetralogioj. Ĝia titolo estas “Ebriiĝo per vento kaj fajro”. Tiun poemaron konsistigas, simple dirite,

la poemoj pri la paco kaj milito. Ses cikloj estas faritaj el poemoj pri diversaj fenomenoj en la dumpaca vivo, la sepa ciklo estas farita el poemoj pri Jugobalkana (Jugoslavia) milito. Tiu civila, interetna milito komencis en la jaro 1991 en Slovenio kaj Kroatio, kaj daŭras eĉ nuntempe, en la suda Serbio kaj Makedonio.

Pri prezentado de nur sep poemoj el la volumo **Ebriiĝo per vento kaj fajro**, anstataŭ parto el la romano **Esperoj, realigoj**, kiu antaŭas **Ebriiĝo...**, mi decidiĝis ĉar la poemoj estas mallongaj.

Dume, mi sciigas vin ke mi estas preta prezenti al vi -krom volumoj **Esperoj, realigoj kaj Ebriiĝoj per vento kaj fajro**- ankaŭ la prozan volumon **Tv-jurnalisto en la epoko de Tito kaj en la epoko de Milošević**. Tiu aŭtobiografia romano estas, verdire, resuma versio de mia **Dua tetralogio**, kies alternativa titolo estas **Ĵurnalista tetralogio**. Titolo de la romano klare informas vin pri temaro de tiu beletra kaj grandparte dokumenta verko.

En ties lasta ĉapitro, titolita “Jugo-NATO printempo”, mi elmontras - per taglibraj notoj en la periodo de la 24-a de marto ĝis la 10-a de junio 1999 - miajn rimarkojn kaj meditadojn pri la armita interveno de NATO-alianco en Jugoslavio. En tiu ĉapitro konsiderinde multaj notoj estas dediĉitaj al bombardado de Televizio Novi Sad, en kiu mi ankaŭ nuntempe oficas (verdire, ne en la origina konstruaĵo, ĉar ĝi estas

*detruita, sed en alia, provizora). Kelkaj notoj estas dediĉitaj al bombardado de tri novisadaj pontoj (precipe de Ponto de Libero, kiun mi preskaŭ ĉiutage trairadis, ĉar Televizio tiam situis apud la kontraŭa bordo de Danubo). En tiu ĉapitro kelkaj notoj ankaŭ estas dediĉitaj al bombardado de la kazerno "Majevica" (kiu troviĝas proksime de mia loĝejo).*

*La Dua apartig-libro, kiu postsekvas Ĵurnalistan tetralogion - en mia Esperanta prezentaĵo ĝi postsekvas la romanon **Tv-ĵurnalisti...** - portas la titolon **Ekflamoj je dislimo**. Tiu volumon konsistigas, krom lirikaj poemoj, poetaj tutaĵoj kiuj apartenas al tielnomata engaĝa literaturo. Tio estas poemoj en kiuj oni pritraktas soci-politikajn okazaĵojn en Jugoslavio dum la jaro 2000. Do, je la dislimo de jarmiloj. Ekzemple, en unu tuta ciklo -la kvina ciklo, sub la titolo "Finalo de la jugoslavia malfeliĉo" -oni poetece pritraktas la disfaliĝon de la reĝimo de diktatoro Slobodan Miloŝević.*

*Ĉi-foje mi prezentos al vi, kiel jam dirite, sep poemojn el la Unua apartig-libro. El ĉiu ciklo mi elektis po unu poemon. Jen la titoloj de cikloj, kaj tre koncizaj sciigoj pri temaroj de tiuj cikloj - jen la sep elektitaj poemoj.*

*Uladimir Kirda Bolhorves*

## De Oriento al Sudo

Unua ĉapitro

### VARIACIOJ JE PRATEMPA TEMO

(Amaj poemoj)

EN ARENO

*Gitaro,  
trankviligu proprajn kordojn.  
Lasu ilin vibri silente,  
tiel silente, ke koroj sentu doloron  
kaj triston profundan.  
Sangadas toreadoro en Granda Areno.  
Ekrigardu: sur vizaĝo lia  
ankoraŭ venka rideto vibras,  
sed larmo frida  
flamon en okulo jam estingas.*

*Ĉu vi ploras?*

*Ploru, bela fraŭlino.  
Flagoj estas mallevitaj je duono de lancoj,  
ĉirkaŭ vi estas la paco.  
Nu, tamen,  
kial vi krizantemojn al batalejo ĵetadas?  
Via toreadoro ne plu estas,  
sed la Areno restas,  
kaj jam morgaŭ anoncos fanfaroj  
festenon de novaj batalantoj.*

Dua ĉapitro

### MALAPERIGADO DE L' HEJMO

ENRIGARDANTE LA INFANAĜON

*Mi vidas altan, ridetantan ĉielon,  
verd-an-flavan-bluan kampvaston.  
Sur ĝi la arkipelagon de griziĝintaj tegmentoj,  
en kiu mi distingas insulon de mi plej ŝatatan:  
la farmdomon de l' avo Aron, farmdomon  
kiu dormetas en la kvieto de somera  
posttagmezo.*

*Malantaŭ la farmdomo, en ombro de laŭlonga,  
iam kalkigita muro, mi vidas la paletan,  
senatentan kvinjarulon.  
Li sidas sur la seka teraltajeto  
kaj inter fingroj neglekte tralasas*

manplateton da polvo.  
 Super lia kapo, en stala malfermaĵo,  
 la kolombo ritme kolombumas.  
 Eĉ pli alte, en lazuro super tegmento,  
 triste muĝas la maldensigitaj  
 branĉaroj de akacioj.

Ventmuelilo restis sen flugiloj,  
 maizgrajnojn muelas la fortega egmuelilo  
 apud larĝa draŝejo. Movforton igas al ĝi  
 brunĉevalo Keŝelj, malrapide vagirante  
 la rondan vojeton.

Avo Aron kaj onklo Janko okupiĝas  
 pri egmuelilo kaj ĉevalo. Draŝejmeze  
 avino Serafa, ĉirkaŭita de kortbirdaro  
 ŝvebas super disigitaj paneroj.  
 Al mi ŝajnas ke ŝi ĝuste  
 aŭflugas de l' ĉielo.

Kvar avo-nepoj,  
 Joakim, Boris, Miron kaj Alek,  
 en ventblova veturilejo,  
 sia infanĝardeno, sia laborejo,  
 faris ion similan al ŝarĝoĉareto.  
 Per helpo de l' avo, ni ankaŭ faris  
 hundajn rimentenilojn, kaj nun ni provantas  
 transformi Rigov kaj Belka en niajn ĉevaletojn.  
 Sed eĉ per lardo antaŭ la muzeletoj  
 ni ne sukcesas ekmovi  
 la konfuzatajn hundojn.

Enrigardante la infanaĝon,  
 mi vidas arĝentkoloran kolombaron  
 kiu flugumas en senfina lazura profundo.  
 Kaj sube, meze de verdaj-flavaj-bluj kampoj  
 unu farmdomon kiu dormetas  
 en kvieto de l' somera  
 posttagmezo.

### Tria ĉapitro POR LA ARTISTA BIOGRAFIO

#### KREADI AŬ VIVI

En baraktado kaj sorto  
 de plimulto da mortontaj senmortuloj  
 estas faktoj kiuj provokas  
 multe pli fortan envion ol admiron;  
 favore al malpli da feliĉaj,  
 iuj ŝajne aŭ vere grandaj  
 provokas eĉ kompaton.

La negocistoj kaj politikistoj,

tenantoj de ĉefaj stangoj de potenco:  
 mono kaj aŭtoritato, estas abonantoj  
 de privilegioj de surteraj dioj;  
 sed la ĝuado de potenco estas malpura,  
 ofte superita per ombro  
 de malamoj, konfliktoj, katenoj.

La brilaj steloj de estrado,  
 sportistoj kaj pseŭdoartistoj,  
 havas allogan ĉiutagecon,  
 plenajn poŝojn, amtravivaĵojn;  
 ilin detruas fragilo de populareco,  
 malpleno kiun ili en si mem portas,  
 kiu post ili restas.

Veraj, rimarkindaj artistoj,  
 post multjara sinofero,  
 la kontentigon ricevas kaj de homoj  
 kaj en profesio al kiu ili sin dediĉis;  
 sed el laŭdoj kaŝaperas kompato,  
 ĉar ili, tro okupite pri Verko,  
 propran vivon perdis.

### Kvara ĉapitro LA KAMPARA EN FAŬKO DE LA URBA AVINO SUR LA BALKONO

Tute en funebra vestaĵo, kun kapo  
 tukĉirkaŭita, silenta kaj senmova,  
 kiel elĉizita el ŝtono,  
 ŝi longe sidas apud la balustrado  
 de malvasta malfermita spaco  
 de duĉambra kaĝo sur tria etaĝo.  
 La filino kaj bofilo estas en la entrepreno,  
 nepoj estas en lernejo. Najbaroj ĉi tie ne ekzistas.  
 Polvon en loĝejo ŝi viŝis, ensuĉigadis,  
 florojn ŝi akvumis, tagmangĵojn finkuiris.  
 Tra mallarĝa, per ĉielo plenumita fendaĵo  
 inter du najbaraj ĉielskrapantoj  
 ankoraŭ unufoje en malproksimon,  
 en iaman tempon ŝi fikse enrigardis.

En vilaĝo, en la longa strato,  
 sopiras al ŝi, kiel fidela hundino,  
 ŝatata, ruiniĝanta domo, en kiu ŝi  
 kvardek plej belajn jarojn travivis.  
 Antaŭ nelonge, je postulo de gefiloj, ŝi vendis ĝin.  
 Neforgesitaj, neanstataŭeblaj najbaroj  
 ankaŭ ĉi-vespere je stratangulo kunvenos.  
 Ĉu ili, ho ve, ankaŭ pri ŝi babiletos?

*Al edzo plenajn dekunu jarojn  
trifoje per semajno ĝis la tomo ŝi iradis.  
Kaj nun maljunulo sub la herbaĉoj dormas.  
Ĉu gefiloj, ho dio, volos almenaŭ  
unu ŝian peton plenumi: ĉu ili  
la patrinon, el la ŝatata vilaĝo,  
el naskiĝgrundo forigitan,  
apud la patro entombigos?*

**Kvina ĉapitro  
VERDA, ĈIAM PLI GRIZA**

(Ekologiaj poemoj)

**UNU MONATON  
POR LA INFANOJ DE  
ĈERNOBILJ**

*Ne pafis fusiloj,  
nek ĉe l' horizonto fajron vomis kanonoj,  
ne hurlis sirenoj,  
nek sur ĉielo bruis bombardaviadiloj.*

*Sed ni tamen, okupiĝante  
pri ĉiutagaj agadoj, komencis pereadi,  
niajn verajn gefilojn, ankoraŭ tute sanajn,  
ridantajn, en infanĝardenoj ludantajn,  
ni komencis senrevene perdati.*

*La morto atakadis niajn ĝardenojn, kampojn,  
arbarojn,  
nian brutarojn kaj kortbirdarojn per nova  
armilo,  
per nigraj sunradioj kaj pluvgutoj  
nin kaj niajn gefiletojn bombardis.*

*“Ĉu pluvo povas mortigi?”  
demandis tiuj kiuj ĝis tiam nenion sciis  
pri izotopoj de jodo, cezio, stroncio,  
pri malpura potenco kiu, kiel malbona elfo,  
kolere gruntas en nuklea centralo.*

*“Ĉi-radiado ne estas danĝera por sano”,  
asertis al ni kruelega burokrata satano,  
konsiderante ke homa vivo estas malpli  
multekosta  
ol la elmigrigo de kelkaj regionoj.*

*Kvin jarojn post la eraro de nerespondecaj  
kaj forkuro de malbona elfo el nuklea botelo,  
okcent mil geknabetoj el Belorusio,  
Ukrainio kaj Rusio malrapide velkadas,  
okcent miloj palajn frontetojn havas.*

*Patrinoj kisas kaj antaŭtime rigardas  
frontetojn malvarmajn, markitajn per signo de  
anemio,  
multaj kaŝite plorsingultas, ĉar ili eksciis  
ke iliaj idoj malsanas de leŭkemio.*

*Ni vivas sur la estingita radianta vulkano,  
manĝante, trinkante, enspirante mortigajn erojn,  
imuneco de niaj geknabetoj estas tiel malforta  
ke ilin mortigas eĉ parotito, morbilo,  
sendanĝeraj gripigaj mikroboj.*

*Por ke ili kiom-tiom plifortigu,  
pligrandigu sian reziston al malsanoj,  
ili bezonas almenaŭ unu monaton restadi  
en sanaj naturaj kondiĉoj.*

*Estu, bonaj homoj de la tuta mondo,  
al niaj gefiletoj dum unu monato savaj dommastroj,  
Dio rekompencos vin, kaj ni petos lin  
ke viaj gefiloj neniam estu devigotaj  
la sanon serĉi ie en fremlando.*

**Sesa ĉapitro  
PER VIVCINDRO PUDRIGITAJ  
(Poetika vivfilozofio)**

**LA PADO**

*Ni diskuris, kuraĝaj, al cent direktoj de l' mondo,  
ankoraŭ junaj, por grandaj agoj pretaj, naive  
scivolemaj,  
rigidaj, sed deziremaj al vagado tra forlasitaj tajgoj  
de Siberio,  
ankoraŭ plensopiraj pri ĝardenoj de Mediteraneo,  
kie la valeriano kaj jasmeno tiel ebruiĝe odorfloras.*

*Ni disiĝis, konfuzitaj, inter vilaĝo kaj urbo,  
ankoraŭ persistaj, por memoj pretaj, per volo  
plenplenigitaj,  
gajaj, kaŝangulojn de nia senlumo ankoraŭ malofte  
enrigardantaj,  
indiferentaj rilate al kono ke tie kaŭras laco,  
kiel silenta mizerulo kiu baldaŭ pensuferos.*

*Ni malgajiĝis, bruletigitaj, en alloga fremlando,  
ankoraŭ malkvietaj, revojn enrigardantaj, malfacilaj  
pro deziro,  
nerompitaj, kvankam jam doloraj de multaj esperoj,  
jam ornamitaj per cikatroj kiujn ni longe ekhavadis  
en aroganta kuregado tra la viva ventoblovo.*

*Ni enordiĝis, fine, je nia direkto de l' mondo,*

*jam tro maturaj, per saĝo penetritaj, trankvilaj kiel vegetaĵoj, serenaj, ĉar ni konsciiĝis pri efemereco de nedelongaj ĉarmoj, ĉar ni perceptis ke mirakloj estas ĉirkaŭ ni, en libroj, ke je nia fenestro unu peonio nun floras.*

## Sepa ĉapitro

### FRUKTOJ DE MALPRUDENTO

(Poemoj pri la unua jaro de

Jugobalkana milito)

VUKOVAR, PERSONE KAJ

FAKTE

Unuaj fabeloj pri tiu bela, idilia urbo al mi rakontis mia plej bona amiko el infanaĝo Ivo Lahvač. Fininte elementan edukon en Kerestur, li revenis al sia hejmgregiono Sirmio, por en ŝatata Vukovar ellerni metion. Kiel tv-mekanikisto li estis pedanta, estimata, havis multajn klientojn, bone salajrumis. Dum jaroj li senlace laboris, diligente ŝparis, kun la edzino, filo kaj patrino novan domon konstruis. Fine de 1' monato aŭgusto de Fatala Jaro, kiam la obusoj komencis surŝuti Vukovar, mi ankoraŭ foje turnis numeron de ilia telefono, sed interligon mi ne ricevis. Kio okazis al Ivo, Spomenka, Darko kaj patrino Olga? mi ofte min demandis.

*La hispana gazeto "El Pais" estas unu el eminentaj ĵurnaloj en Eŭropo. Ĝia raportistino el Belgrado estas sinjorino Mirjana Tomić, nia samnacionano, sed tio ne influas objektecon de skribado. "Mi estas ŝokita per scenoj kiujn mi vidis sur batalejoj en Kroatio. Mi estis en Vukovar, ankoraŭ dum ĝi ne estis sieĝita de soldataro. Mi interparoladis kaj kun serboj kaj kun kroatoj. Mi estis en iliaj domoj. Hororigis min la tragedio de tiuj homoj. En Vukovar kaj aliaj regionoj, kiuj nun estas en militoperacioj, ili bone vivis. Tio estas, plejparte, riĉaj regionoj. Mi rigardis homojn kiuj forlasantis siajn domojn, somerdometojn, laborejojn, veturilojn kaj egajn riĉaĵojn kaj familie por ciam foriradis el sia naskiĝregiono. Tio estas penigaj homaj dramoj."*

*Mi estis puberulo kiam mia kuzino Jevdokija Glanko edziniĝis kun Venedikt Miklovs, la majstro en Kombinato de gumo kaj ŝuoj "Borovo". Ili ambau*

*fervore laboris, diligente ŝparis, por baldaŭ en Mitnica, proksime de akvoturo, malnovan domon aĉeti. (Ili eĉ ne povis imagi ke dum unu nigra aŭtuno Mitnica-n, kaj la akvoturon mem, pro batalegoj tie farotaj, la tuta mondo ekkonos.) Poste dum jaroj novan neston ili mem konstruis en Borovo Kolonio, kaj la malnovan domon donacis al filino kaj bofilo. Ili trankvile kaj feliĉe vivis. "Kara onklino, ni sentas nin tiel bele, ĉio al ni fluas tiel bone, ke mi iufoje timas ke al ni io malbona okazos", diris antaŭ nelonge Jevdokija al mia patrino. Komence de ĉi-jaro ŝi mortis pro hepatacancero. Ni entombigis ŝin en la nova Urba tombejo (kadre de kiu dum ĉi-tagoj oni amase entombigas konatajn kaj nekonatajn vukovaraĵn pereintojn). La filino de Jevdokija restadas, kun du infanoj, ĉe Venedikt-fratino en Novi Sad, bofilo estas je fronto, kaj Venedikt mem gardas domon en Borovo Kolonio. Al ni, kuzoj, lia sorto ĉi-momente ne estas konata.*

*La sorto de Vukovar ne povas eviti historian simbolecon. En tiu urbo en 1919 estis fondita Komunista partio de Jugoslavio, el tiu urbo ekiris ĝuste antaŭ ses monatoj, je la 1-a de majo, polica unuo kiu enfalis embuskon en Borovo Vilaĝo. Vukovar, urbo en kiu dum plurpartiaj elektoj venkis la eksa komunista partio de Kroatio, SDP, havis malfeliĉon esti la unua, kaj kiel la unua - estante avangardo al ni ĉiuj ceteraj - sperti ekstremajn konsekvencojn de ideologia kaj nacia ebruiĝo.*

Kiel tv-ĵurnalistino, mi multfoje restadis en Vukovar, kaj en proksimaj vilaĝoj Petrovci kaj Mikluŝevci, en kiuj vivas miaj samnacionanoj. Ĝuste antaŭ dek jaroj, en somero de la senzorga okdekunua, kun ekipo mi faris okminutan tv-portreton de la ridanta mezlernejanino Naĝija Ĵdinjak, membrino de la Remklubo "Vukovar". La portreton ni surbendigis en domo de 1' sportulino, en ŝia lernejo, en la Remklubo, je Danubo. Ŝiaj gepatroj diris al mi, dum babilado, ke ni estas foraj parencoj (laŭpatrina avino de Naĝija, nome, apartenis al la familio Glanko). Amikinoj de Naĝija el remkvaropo kun direktanto diris al mi ke en Klubo estas kaj serboj, kaj kroatoj, kaj rutenoj, kaj hungaroj. Ili estas konkordaj, kiel familio. Neniu, dume, diris al mi, pro nescio, ke post dek jaroj, sur malgranda doko sur kiu ni interparolis, okazos hororoj. Ke pri ili skribos, krom aliaj, ankaŭ la ĵurnalistino Milan Ĵegarac - en lasta militraporto. Ke li skribos ĝin antaŭ ol, kuraĝe kaj nesingarde, esti falĉita per mitralpafaro.

*Serbaj liberigantoj kaj iliaj skoltantoj, kiuj multfoje sukcesis atingi Borovo Kolonion kaj Vukovar, eksciis ke Serboj en kelo de konstruaĵo de Teritoria defendo estis torturataj plej bestie. Post torturado, iliaj kapoj estis frakasataj per martelegoj, kaj iliajn mortajn korpojn ustaŝoj forportadis ĝis la Remklubo en la centro de Vukovar. Tie selektitaj nigraĉemizuloj distraĉis iliajn ventrojn kaj, anstataŭ eligitaj organoj, en internajojn metadis ŝtonojn, kaj poste tiujn korpojn forjetadis en Danubon.*

Eĉ dum ĉi-tagoj, en la tria dekada de novembro, tuj post fino de inferaj bataloj en la detruita Vukovar, mi demandas min kio okazis al Naĝija Jdinjak, al ŝiaj geamikoj el la Remklubo. Mi demandas min kio okazis al plimulto de miaj amikoj, konatoj, parencoj el Vukovar, Petrovci, Mikluŝevci. Mi estas konvinkita ke iu ajn el ili, entute, malamis nek serbojn, nek kroatojn, nek anojn de iu ajn alia popolo, ke ili deziris solsole: trankvile vivi, kun ĉiuj konkordare. Ordinaraj homoj, dume, iufoje ne decidis pri propra sorto. Kaj mi denove demandas min: Ĉu ili estas vivaj, ĉu vunditaj, dislokigitaj? Ĉu iuj estas, eble, pafmortigitaj, gorĝtranĉitaj, kaj, kun distraĉitaj ventroj, en Danubon ĵetitaj?

*Tamen, sinjorino Tomić ne povas ne scii ĉi ĉagrenigajn faktojn. "Kaj serboj kaj kroatoj kiujn mi ekkonis montradis al mi fiere, tio min konsternadis, kasedojn je kiuj ili surbendigis kiel ili gorĝtranĉas siajn 'kontraŭulojn'. Serboj en Vukovar, konsiderante ke mi estas serbino, konfide vidigadis la bendojn ke ankaŭ ili 'scipovas defendi sin', kaj kroatoj, konvinkitaj ke mi, kiel raportistino de 'El Pais', povas kompreni ilian 'sindifendon', montradis al mi vidbendon kiel ili gorĝtranĉas serbojn. Estis vomige, kaj mi dum tagoj estis konsternita. Mi devas diri, unue kiel homo, ke tiel hororaj scenoj en ĉi-jarcento ne estis videblaj. Ĉi-milito en Jugoslavio estas al mi nekomprenebla, kaj mi opinias ke ĝi estas rezulto de interkonfliktoj de certaj naciaj elitoj, kiuj, plugardante sian totalisman aŭtoritaton, emas oferi sian tutan popolon."*

Antaŭhierau, la dudekduan de novembro, al ni per telefono, el domo de sia kuzeno en Inĝija, anonciĝis Spomenka Lahvaĉ. Rifuĝintino. Mia unua demando estis: "Kio okazis al Ivo?" "He, Ruben, mia Ivo ne plu estas", diris ŝi plorante. Ĉi-matene mi kun edzino forveturis al Inĝija. Spomenka priskribis al ni la familian tragedion.

Ĝis la mezo de aŭgusto Ivo nenie volis forlasi la domon kiun li dum jaroj konstruadis kaj, ankoraŭ ne konstrufinitan, per meblaro, diversaj aparatoj kaj multaj aliaj domezonoj plenumadis. Kiam obusoj komencis proksimen fladi, kiam li perceptis ke milito ne haltiĝis, estis tarde. El Vukovar oni ne plu povis eliri. (Feliĉe, Darko ĝustatempe eskapis, kaj baldaŭ ĉe onklino en Germanio troviĝis.) Keloj estis por multaj, ankaŭ por familio Lahvaĉ, nuraj rifuĝejoj. Kartoĉoj fajfadis, obusoj eksplodadis. La nova domo suferadis. Ivo-malfeliĉo estis ankaŭ insida malsano: trombozo. La dekan de oktobro matene, post timigegega eksplodo en proksimo, ekmoviĝis en lia gambo mortiga trombo. Rezervo de kuraciloj estis konsumita, al hospitalo oni ne povis ekiri. "Mi sentas min malbone... Mi sufokiĝas!" diris Ivo al edzino, patrino kaj frato. Unu minuton poste li estis morta. Kriego, senhelpa petkriado. Ili envolvigis lin en nilonon, elportis en ĝardenon. Dum momentoj de batalpaŭzoj ili malprofunden enterigantis lin. Mia amiko Ivo nun en sia ĝardeno dormas.

*Vukovar falis ĝuste post tri monatoj de sieĝado. La bela malnova urbo estis tute detruita, ĝi plej multe similas al Varsovio el 1945. El 45.000 loĝantoj kapitulacjon ĝisatendis ĉirkaŭ dek miloj (ĝusta nombro ankoraŭ ne estas konata). Ili ĉiuj pasigis tri antaŭajn monatojn en keloj kaj sentas malfacilaĵojn de vido kiam ili eksteren eliras.*

Spomenka Lahvaĉ baldaŭ ekvojaĝos en Germanion, al fratino (serbino) kaj bofrato (kroato). Ŝi vidos almenaŭ sian filon. Sian Ivo ŝi neniam plu vidos. Nek ŝi, nek Darko, nek frato Slavko, nek afliktita, pro dolor? perdiĝinta patrino Olga. Ilia Ivo en sia ĝardeno dormas. Multaj Vukovar-anoj neniam plu vidos proprajn infanojn, gepatrojn, vivekunulojn, stratojn tra kiuj ili tre multfoje iradis, domojn en kiuj ili dum la plej belaj jaroj restadis.

*Vukovar estas nun detrujejo! Tio ne plu estas novinformo. Tio estas fakto kun kiu ni vivas ekde 1991 kaj plue eterne. Vukovar, kia ĝi estas hodiaŭ, reprezentas simbolon de malĉasto en homoj. Admonon. Ĝian lokon endas testamenti al tempo por ke ĝi fordiĝestu tie akumulitan malbonaĉon. La detruita Vukovar estas averto pri tio kio al ni povas okazi. La estonta Vukovar estas pruvo de tio kio al ni okazas nuntempe. Vukovar simboligas nun, por ĉiam.*



## Ĉu honto?, mi diris...

Dum la pasinta Kongreso 60-a de la Hispana Esperanto Federacio mi prelegis pri **La sindromo de Babelo**, kiun oni povas legi hispane (<http://storm.prohosting.com/jesuo/sindrome.htm>) kaj angle (<http://storm.prohosting.com/jesuo/babelian.htm>) en Interreto. Mi publikigis ĝin ĉi tie la venontan numeron, sed mi nun antaŭmetas la enkondukon, kiun mi verkis *ad hoc* (aparte por la okazo) ĉar mi kredas, ke tuŝas gravan flankon de esperantismo ĉiutaga.

Estimataj estraranoj, pacienciaj gesinjoroj, karaj samideanoj!

Multajn esperantistojn ĝenas la *venkisma* sinteno de neesperantistoj pri la angla. Mia prelego pruvas tion, ke la angla ne sole ne venkis, sed ankaŭ tion, ke estas objektivaj kialoj por tio ke la angla *ne povas esti internacia lingvo*, kaj ke la sola afero, kiu povas igi ĝin monda, estas subpremado, same kiel okazis pri la latina antaŭ mil jaroj aŭ la franca antaŭ du jarcentoj.

Dum mia prelego mi uzos argumentojn, kiujn oni povas uzi por kontraŭi tiujn stultajojn diritajn de denaskaj aŭ *gurkhaj* angloparolantoj.

Mi ankaŭ volas aserti, ke mi sentas kompaton kaj zorgon kiam mi vidas, ke estas **esperantistoj, kiuj hontas pri tio, ke ili estas esperantistoj**. Esperanto estas motivo por *fieri*, ne por honti. Kompreneble, estas ĉiam *lertuloj*, kiuj provas pruvi, ke *Esperanto estas bona ideo, sed ideo kiu ne sukcesis en sia tempo oportuna* aŭ alia stultajo.

Kelkaj el tiuj esperantistoj ne vidas motivon por honto pri, ekzemple, aneco al futbala klubo. Eĉ se tio estas sekteca

kaj gvidas onin al perforto aŭ malestimo al anoj de aliaj kluboj. Ĝi krome implikas apogi homojn malhonestajn, kiuj uzas meregule la monon de la klubo, kiel verŝajne okazis al Atlético de Madrido, kaj ankaŭ se normalaj demarŝoj de kluboj estas *nemoralaj* se ne *maljuraj* rilate al la *aĉeto* kaj *vendo* da *ludistoj*. Aliflanke, estroj de esperantaj asocioj neniam rabas monon de la anoj, ilian honestecon oni ne eblas pridubi, ilia sindonemo kaj malavareco estas kristalklare videbla, kaj la afero de esperantaj asocioj ne baziĝas sur malestimo aŭ sekteco, sed sur la tuta malo. Esperantistoj estas sindonemaj kaj akceptemaj perdifine, kaj ilia plej amata revo estas, ke la tuta homaro kunhavu saman lingvon por interkompreniĝo.

Nur se ni fieras pri nia bela kaj efika lingvo, ni povas kontraŭargumenti sen time tiujn supraĵojn, kiujn oni diras per *luitaj* aŭ *prunteprenitaj* pensoj, kiujn *oni legis iam ie...* Ni kontraŭu ilin per pruvoj kaj argumento. Mi provas klarigi pri ambaŭ per mia prelego, en la hispana lingvo.

Mi ne diras mian prelegon en Esperanto pro du kialoj: al hispana esperantisto multe pli efikas tiujn argumentojn rekte en la hispana, kaj mi ne havis tempon esperantigi la prelegon por ĉi tiu okazo. Tamen, mi provos klarigi pri ĝi al eksterlandanoj post la prelego.

**NOTO.** Por publikigo en *Kajeroj el la Sudo*, mi ja tradukos la prelegon venontnumere.

*Jesuo de las Heras*

## La kongreso de San Javier, HEF 60-a

Sepdek kvin esperantistoj partoprenis la 60-an Kongreson de la Hispana Esperanto Federacio en sunbrilaj urboj San Javier kaj Santiago de la Ribera, apud la *Malgranda Maro*.

Dum tiuj tri tagoj, oni inaŭguris la novan Placon Esperanton, Miguel Gutiérrez Adúriz gvidis seminarion pri *Eldonado de libroj, revuoj kaj bultenoj per komputilaj rimedoj*, kaj estis kurso de Esperanto, gvidata de Celso Sánchez Sánchez, kiu ankaŭ prelegis pri ***Diskriminacio pri lingvo***.

La Ĝenerala Asembleo okazis dimanĉon, la 24-an de junio, kaj tie oni decidis, ke HEF ne kongresumos en Verona (Italio) en aŭgusto de 2002. Anstataŭe, oni kunvenos en Teruel ĉirkaŭ la *ponto de majo*. Ankaŭ je tiu asembleo oni decidis reelekti la nunan estraron de HEF unuanime.

Tuje post la asembleo, mi diris prelegon pri *La sindromo de Babelo*, en la hispana, kies esperantan enkondukon estas en paĝo 20-a. Mi inkluzivos la esperantigitan tekston en la venonta numero de ***Kajeroj el la Sudo***.

Sekvas en paĝo 7-a



Novan Placon Esperanton inaŭguras en San Javier Prezidanto Sanĉo.



Tradicia foto kongresa.

## Enkonduko en muzikon

### Pri terminaroj

Ooŝida Takeŝi kaj Andreo D. Marŝal skribis al mi pri muzika terminaro antaŭ kelkaj monatoj. Ambaŭ esprimas sintenojn pri muzikaj vortoj, kies tutan eldonitan katalogon oni trovas en la **Muzika Terminaro kun Alfabeto Indekso** de Butler and Merrick kaj Davido Hill, publikigita de MEL (Muzika Esperanto Ligo) en Sofio je 1992.

Mi komencis ĉi tiun serion de artikoloj pri tiu ĉi temo ĉar mi sentas, ke la verko ĵus menciita estas tro influata de la anglaj lingvo kaj muzika tradicio, kiuj kuŝas preskaŭ ekskluzive sur instrumentoj, kaj ne sur homa voĉo, kiel okazas en la lando kie oni plej frue fiksis muzikon sur paperon, Italio.

Mi diris en la unua artikolo de la serio (**Kajeroj** n-ro 40, oktobro de 1998), ke *la lingvo de muziko estas ĉefe itala, kaj pro tio oni devus konsideri la italan — ne la anglan — kiel evidentan fonton por terminoj tehnikaj*, same kiel (mi aldonas nun) oni elfontas novan vortaron pri komputiloj el la angla, ĉar usonanoj kreis la konceptojn rilatantajn al tiu temo. Sed tio estu nur mia sinteno kaj mia ago. Tiucele, mi komencis publikigi la citatan serion de artikoloj, ankaŭ konatan kiel **Kurson de MEL**, dirinte pri ĝi al la estraro de Muzika Esperanto Ligo. Post la publikigo, mi esperas, ke estos debato sufiĉe serioza pri la afero, sed ne el angla, sed el esperanta vidpunkto (kaj

ne el el-angla-tradukite esperanta vidpunkto!)

La laboro ja estas tiom longa kaj eble tediga, ke ni ne povas esperi fini ĝin en unu sola sesio dum la venonta Kongreso Universala en Zagrebo. La temo ja indus apartan kongreson de MEL. Sed ni ne utopiu, kaj proponu praktikan solvon: ni proponu la farotan laboron en la venonta kongreso, kaj fari ĝin dum la venontaj jaroj pere de Interreto. Tiucele mi kreis dissendoliston muziko@yahoo.com. Ĉar ĝi estas tasko nur por volontuloj, al kiuj ne gravas dediĉi tempon kaj labori eĉ pene por tiu afero, kiuj volas diskuti plene la aferon, terminon po termino senlace kaj dezirante atingi solvon por ĉiuj kaj por ĉiam, la listo estas *privata*. Tio signifas, ke ne eblas, ke oni aliĝu sin mem. Mi devas aliĝi voluntulon persone. Do, mi petas al ĉiu melano, ke ili petu min aliĝi ilin al tiu listo.

Mi denove klarigas, ke tiu serio de artikoloj de mi publikigata en **Kajeroj el la Sudo** kaj papere kaj elektronike ĉe <http://storm.prohosting.com/jesuo/mkurso.htm> estas *propono*, kiun oni devas ĉu akcepti, ĉu korekti -eĉ tute- post longa pridiskutado.

La venontan numeron, ni daŭrigos nian prelegon pri tablaturado. :-)

Propone via,

*Jesuo de las Heras*



### BULTENO DE HISPANA ASOCIO DE LABORISTOJ ESPERANTISTAJ (HALE)

REDAKCIO: Poŝtkesto 4461, Tfn° (00 34) 658  
E30080 MURCIA, 166 323  
HISPANIO

Retskribu al  
[jesuo@ono.com](mailto:jesuo@ono.com)

<http://www.iespana.es/kajeroj.htm>

<http://kajeroj.50megs.com>

[Esperanto@iespana.es](mailto:Esperanto@iespana.es)

## STATUTO de SAT

### MEMBRECO

2. Ekzistas du kategorioj de membroj: aktivaj kaj subtenantaj.
3. Povas esti aktiva membro ĉiu persono scipovanta Esperanton kiu, akceptinte ĉi tiun statuton, pagas la jarkotizon, ĉiujare fiksitan de la Plenum-Komitato (P.K.).
- 4 Aktivaj membroj rajtas: A) ricevi la Jarlibron (SAT-adresaron) kaj la oficialan organon de la Asocio, B) Partpreni en ĉiu referendumo, C) Voĉdoni en la Kongresoj, Ĉ) Uzi la ĝeneralan servojn de la Asocio. Aktivaj membroj do povas influi la gvidadon de la Asocio; ili havas la devon ĉiel laŭpove helpi al la progresado kaj bona funkciado de la Asocio.  
  
La samfamilianoj de aktiva membro povas ĝui la samajn rajtojn kiel ĉi tiu lasta, pagante nur la duonan kotizsumon. Tiaj membroj tamen ne ricevas apartan ekzempleron de la oficiala organo.
5. Povas esti subtenata membro: A) Lernanto de Esperanto, B) Ĉiu organizo, esperantista aŭ ne, kiu deziras subteni la Asocion per monhelpo. Subtenantaj membroj ricevas la Jarlibron (SAT-adresaron) kaj rajtas uzi la ĝeneralajn servojn de la Asocio.

(Dua pago de la STATUTO DE SAT)